# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 10 Oktobro, 2016


*Karaj legantoj, en oktobra numero de la bulteno vi trovos informon pri la E-eldono de "Epitomo", libro de nia samideano Hiram Crespo, kiu jam aperis angle kaj hispane; E-tradukon de poemo de Nobel-premiito W. Szymboerska, laŭtlegita dum la lasta UK, aliajn novaĵojn de E-mondo.*


*Ne forgesu, ke ankaŭ oktobra kunsido de la Ŝikaga E-societo okazos merkrede (ne marde)!*

–La Redaktoro

## Nova E-libro: "Epitomo" *de Hiram Crespo*

La *Societo de Amikoj de Epikuro* ĵus eldonis esperanto-lingvan Epitomon: Epikuraj Skribaĵoj por la samideanoj de la XXI-a jarcento. Ĝi "estis verkita por homoj kiuj volas apliki la instruojn de tiu ĉi kosmopolita filozofio de persona feliĉo en ilia vivo", kaj serĉas alporti la filozofion al la vivoj de ordinaraj homoj. Diras la enkonduko:

"*Ni scias, ke la antikvaj Epikuranoj ĉien marŝadis kun Epitomoj, studante kaj enmemorigante la instruojn. Laŭ Norman DeWitt en lia libro 'Epikuro kaj lia filozofio', la Epikuranoj komencis iliajn studojn kun la Eta Epitomo, kiu postvivas hodiaŭ kiel la Epistolo al Herodoto, kaj tiam ili gradiĝis al la Ega Epitomo*."




La libro havas edukajn celojn, kaj sekvas formaton de ĉapitroj kaj versoj kun la celo faciligi referencon kaj dignigi la tekston de konsiderinda historia valoro, kiun ĝi enhavas. Ĝi inkludas la jenan enhavon: 40 Ĉefaj Doktrinoj, Vatikanaj Diraĵoj, Leteroj al Meneceo, Herodoto kaj Pitoklo, Kronikoj de'l Lernejestroj, kaj 9 Rezonadoj pri'l Rulpaperoj de Herkulano. La enkonduko, traduko kaj studgvido estas far Hiram Crespo. La naŭ rezonadoj bazitas sur la fragmentoj de rulaĵoj kiuj postvivis la erupcion de Monto Vesuvjo je 79 de la Komuna Erao en la praurbo Herkulano, tiel-nomita la "*Nag Hammadi humanista*". La rezonadoj estas prezentitaj en klara kaj organizita ekspozicio resuma kun modernaj komentoj.

La epikuranoj antikvaj estis atomista Skolo rekonita pro sia insisto, ke ĉiu rezonado devus ĉiam rilati al la evidenteco, kaj ili estis pioniroj de la moderna scienca penso. Ili proponis la teorion de la atomo, fruan version de la teorio de natura selektado, pra-teorion de fotonoj, laikan etikon de feliĉo, kaj ili festis la amikecon inter egaluloj kaj la socian kontrakton kiel bazo de justeco. Ili estis ankaŭ la sola progresema pralernejo kiu permesis virinojn inter siaj lernantoj.

En la moderneco, la epikuranoj de Grekio redaktis la Deklaron de Palini kaj prezentis iniciaton al la Eŭropa Unio por ke la rajto de ĉiuj eŭropanoj al feliĉo estu rekonita. Dum la lastaj ses jaroj, ili ankaŭ organizis jarajn simpoziojn februare, honorante la naskiĝtagon de Epikuro.

La traduko al esperanto, komentoj kaj studgvido de la Epitomo estas far Hiram Crespo, ankaŭ editoro de Society of Epicurus, aŭtoro de Tending the Epicurean Garden (angle kaj hispane), kaj tradukisto de Kelkaj Tagoj en Ateno al la hispana. En TtEG, citante studojn de neŭrosciencistoj kaj sociaj sciencistoj, li montras la ankoraŭan moralan uzeblecon de la scienco de feliĉo instruita far la filozofo Epikuro de Samoso antaŭ 23 jarcentojn.

Epítome estas havebla rekte de CreateSpace, de amazon.com, kaj aliaj fontoj. Por pliaj informoj kontaktu la aŭtoron kaj fondinto de SAE, Hiram Crespo, retpoŝte per info@societyofepicurus.com.

## Wisława Szymborska (1923-2012)

En septembra n-ro de "Saluton!" aperis inform, ke dum la 101-a UK en Nitro "nia prezidanto Les' havis okazon prezenti poemon de pola Nobel-premiito W. Szymborska". En Esperanto aperis Mi inventas la mondon, kolekto de poemoj de Szymborska el la tuta periodo de ŝia verkado (1945–2012). Ĝi estis eldonita en 2015 de Bjalistoka Esperanto-Societo. Jen estas fragmentoj de la laŭtlegita poemo:

☞

# Kato en Malplena Loĝejo (fragmentoj)

***Morti – tion oni ne faras al kato.***
***Ĉar kion faras kato***
***en malplena loĝejo?***
***...***
***Ĉiuj ŝrankoj estas jam enrigarditaj,***
***la bretoj trakuritaj,***
***Per enpuŝiĝo okazis kontrolo sub-tapiŝa.***
***Eĉ estis rompita la malpermeso***
***disŝuti paperpecojn.***
***Kion pli ja oni povas fari.***
***Dormi kaj atendi.***

***Se li nur revenus,***
***Se li nur aperus***
***Tiam li ekscios***
***ke tiel agi kun kato ne decas.***
***Tiam eblos aliri al li,***
***sed kvazaŭ tute pretervole,***
***malrapide,***
***sur tre ofenditaj piedetoj,***
***kaj sen iaj saltoj aŭ pepoj komence.***


*Wisława Szymborska*

## Adreso:


Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org


## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

**26an de Oktobro (Merkredo)** – Lingvaj ekzercoj

**22an de Novembro** – Temo estos anoncata

**11an de Decembro** – Zamenhofa Tago

# AMU Poznanon Daŭras en 2016-17!

Antaŭ tri jaroj ESF lanĉis kampanjon "AMU Poznanon" por trovi aldonan financadon por Interlingvistikaj Studoj en Poznano (Pollando) ĉe la Universitato Adam Mickiewicz UAM, aŭ AMU. ESF jam de jaroj subtenas la trijaran postdiploman programon en la prestiĝa kaj dua plej granda universitato de Pollando, kaj la celo de AMU Poznanon estis kolekti, kun la helpo de esperantistoj, aldonajn 5 mil usonajn dolarojn por tiu unika programo. La pasintaj du kampanjoj estis sukcesaj: ĝi atingis la deziratan celon dank' al malavaraj kontribuoj de multaj esperantistoj, kaj ni ĝojas anonci, ke la ESF-estraro decidis daŭrigi AMU Poznanon ankaŭ por la studjaro 2016-2017, kun la sama ambicia celo: kolekti aldonajn 5 mil dolarojn por la programo. AMU Poznanon funkcias simple: ĉiu donaco al tiu ĉi programo estas duobligata de ESF, ĝis la sumo de 2500 dolaroj, tiel ke la Interlingvistikaj Studoj ricevas entute la sumon de $5000, aldone al la regula subteno de ESF. AMU Poznanon estis lanĉita en bona momento, ĉar la lasta grupo de gestudentoj estis multe pli granda, ol kutime, kio postulas pli grandan subtenon ol en la pasinteco. Multaj studentoj venas el neriĉaj landoj, kelkaj devas veturi grandajn distancojn por veni al Poznano por la du ĉeestaj sesioj kaj la ekzamenoj ĉiujare, kaj pro tio la aldona helpo de esperantistoj kaj ESF estas aparte aprezata. Ĉi-aŭtune, komence de la tria jaro por la studentoj de la grupo 2014-2017, aparte bunta pro la koincido de la aŭtuna sesio ĉe AMU kun la kultura festivalo Arkones, ESF denove invitas la esperantistojn kontribui ĉu al la programo AMU Poznanon aŭ fari ĝeneralan donacon al ESF por helpi financi la ekzistantajn projektojn, subtenatajn de ESF, kiel Lernu.net kaj Edukado.net, kaj por povi investi en novajn promesplenajn iniciatojn. Se interlingvistikaj studoj interesas vin, pripensu aliĝi al la sekva grupo: 2017-2020!

Fari donacon al AMU Poznanon: http://esperantic.org/amu

# Super-BEK-kurso

La kurso estos novstila, kaj bona ankaŭ por posta kopiado en lokaj grupoj. Ĝi estas ne instruo-centra kurso, sed lerno-centra kurso por plenkreskuloj je la dua kaj tria nivelo de Esperanto, do malfermiĝas la pordo al novaj kursgvidantoj en Esperantujo. Por tiaj kursoj ne bezonatas Andreo Cseh aŭ Einstein... bezonatas suffice lerta kaj altkultura homo kiu ŝatas homojn, lernadon, kaj volas aŭskulti kaj ne regi ĉiun paŝon de la leciono. Jen alkroĉita mia invitoletero: http://gresillon.org/IMG/pdf/invito_de_dennis_keefe_al_super-bek-kurso.pdf

*–Dennis Keffe, kurs-aŭtoro*

